



53A HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO

Malago, 16-21 de julio, 1994

DOKUMENTARO

Kongresa Debato pri HEF

Juan Antonio Giménez
Pl. Pintor Segrelles, 1-B-19.ª
46007 VALENCIA

I PRIORITATOJ

Post atenta esploro de la nunaj cirkonstancoj ni trovas ĉefaj la jenajn prioritatojn:

1.1 Disvolvo de Esperanto per la formo de la Estraro.

Honora Komitato de la

53-a Hispana Kongreso de Esperanto

Prezidanto: Manuel Chaves, prezidanto de la Aŭtonoma Komunumo de Andaluzio
José M^o Ruiz Povedano, prezidanto de la Provinca Deputitaro de Malago

Vicprezidanto: Fernando Arcas Cubero, Provinca Delegito pri Kulturo kaj Medio
Juan Paniagua Díaz, Provinca Delegito pri Edukado kaj Scienco

Estraro de HEF

Prezidanto: Antonio Alonso Núñez
Sekretario: Marcos Cruz Martín
Vicprezidanto: José M^o Galofré Domingo
Kasisto: José M^o Bernabéu Franco

Organiza Kongresa Komitato

Prezidanto: Andrés Martín González
Sekretariino: Ángeles Salazar Blázquez
Kasistino: Enriqueta Hurtado Márquez
Loĝado kaj Amuzo: Julio Herrero Segura
Antonio González Álvarez

Komputiligis: J.F. Martín del Pozo (ankaŭ helpis Miguel Gutiérrez Adúriz).

Kompostita per *Windows 3.1* kaj *Microsoft Publisher*.

Finpresita la 9an de julio de 1994.

Kongresa Debato pri HEF

I PRIORITATOJ

Post atenta esploro de la nunaj cirkonstancoj ni trovas ĉefaj la jenajn prioritatojn:

1.1 Disvastigo de Esperanto per informado kaj instruado.

Kelkaj ideoj por tion fari

1.1.1 Finpretigo de modesta informilo (flugfolio) por amase disdoni okaze de ajna evento kun lingva karaktero. Ĝi estu nia unua paŝo ĉe ĝenerala, poste pli ampleksa, informado.

1.1.2 Interkonsenti kun aliaj kastililingvaj landaj asocioj de Ameriko, la eldonon de kolora altkvalita informilo (duaŝtupa en la informado) por disdono al veraj interesitoj Ĝia kosto estus pagata de ĉiuj.

1.1.3 Difini plej konvenan propagandan tagon por la jaro, kaj agi ĉiuj, laŭ difinita plano, kunordigite en tiu dato. *ĉia de la informacion del 2o*

1.1.4 Definitive krei Informan Fakon, kiu, interalie, lanĉu informilon en la kastilia (kaj eventuale en aliaj lingvoj de la ŝtato) por sendi al la novaĝagentoj kaj apartaj membroj (nomoj?).

1.1.5 Krei datumbankon en Madrido kun la nomoj de tiuj homoj pretaj prelegi, en ajna ŝtata lingvo, pri la diversaj flankoj de Esperanto.

1.1.6 Kreo (aŭ traduko) de perkoresponda kurso (kunordiganto povus esti Antonio Valen; tamen, kiu kurso? Ĉu *Jen nia mondo* de Wells?, tiuokaze HEF trovu tradukonton).

1.1.7 Eldono de iom pli modernaj lernolibroj adaptitaj al la nunaj bezonoj de niaj grupoj (Miguel Gutierrez, Georgo Kamacho, Marcos Cruz...).

1.1.8 Fari la necesajn paŝojn por ke niaj lernolibroj kaj vortaroj estu disvendataj en ajna magazeno aŭ librejo. Ĉu HEF fariĝu eldonanto, distribuanto...? (Komisiito esploru la eblecojn).

1.1.9 Oferti kursojn kiel eble plej profesiecajn (pagatajn), ne nur en niaj sidejoj, sed ankaŭ en kulturaj asocioj kaj lernejoj.

1.1.10 Apogi, laŭkonvene, la TV-kurson preparatan de Internacia E-Instituto (Nederlando), tamen postulante ioman intervenon, eble per la kunlaboro de hispano en la projekto (KAMAĈO).

1.2 Fortigo de HEF.

Kelkaj ideoj por tion fari

1.2.1 Apogi la laboron de la Estraro per la starigo de komisionoj, gvidataj de sufiĉe engaĝitaj homoj (membroj aŭ ne).

1.2.2 Krei komisionon, kiu pretigu dosieron pri la titolo "Publika Utileco", kaj studu kaj disvolu ĉiun eblecon rilate al ĝi (kunordiganto povus esti Juan Carlos Ruiz).

1.2.3 Kreskigo de la membraro. En la nuna situacio eble konvenus unue aranĝi kampanjon por reakiro de iamaj membroj kaj izolaj movadanoj.

1.2.4 Nepra solidigo de la agado en la Centra Oficejo, prefere pere de volontuloj ol pere de salajrata homo, kun speciala atento al la librotenado (ĉu eble simila al tiu de UEA?).

1.2.5 HEF devas krei al si apartan datum-bankon pri diversaj jen oficialaj, jen neregistaraj asocioj, fondaĵoj kaj alitipaj instancoj konsulteblaj por la korekta disvolvo de nia agado, kun informoj pri la bezonataj protokolaj dokumentoj kaj plej oportunaj datoj por ties prezentado.

1.3 Utiligo de Esperanto en kiel eble plej multe da agad-kampoj, kaj riĉigo de ĝia kulturo.

Ideoj por tion fari

1.3.1 Esplori, pere de komisiono, la eblecojn de aplikado de Esperanto en la ekonomia kampo (Andrés Martín)

1.3.2 Kreado de komisiono, kiu okupiĝu, kaj pri eldonado, kaj pri akiro de la necesaj subvencioj (Lupe Sanz, M. Fernández,...).

2 FINANCOJ

2.1 La Asocio nomumu komisiiton pri financa evoluigo, kiu klopodos ajnarimede akiri monon, jen pere de subvencioj. jen alirimede (nomoj?).

2.1.1 Krei komisionon por la relanĉo de Fundación Esperanto. Tiucele oni devus pretigi materialon pri testamentado de mono, organizi kampanjojn por akiri donacojn de membroj (ne nur poŝte, sed ankaŭ telefone kaj per personaj kontaktoj).

2.1.2 La Asocio klopodu akiri reklamojn por siaj eldonaĵoj.

2.2 La kongresoj devas alporti financon profiton. Tiucele oni nomumu "konstantan sekretarion", laŭ la modelo de UEA. (Augusto Casquero)

2.3 Oni devas serĉi klientojn por niaj varoj (ĉefe lernolibroj kaj vortaroj) ekster la Esperanto-movado.

5.4 Individuaj Membroj

2.4 La Asocio esploru vojojn al akiro de ĉiaspecaj subvencioj kaj aliaj formoj de subteno flanke de instancoj urbaj, regionaj, ŝtataj kaj de la Eŭropa Komunumo (Lupe Sanz, Augusto Casquero,...). Tiucele endas pretigi dosieron, kiun oni devus ĝisdatigi ĉiujare, por prezenti al la Ministerio de Kulturo.

3 ORGANIZAĴOJ

3.1 Junularo

3.1.1 HEF konsultu la junularan kolektivon, se tiu ekzistas en tia formo, cele al dezirinda kunlaboro.

3.2 Grupoj, Regionaj, Landaj kaj Fakaj Asocioj

- 3.2.1 La Asocio nomu komisiiton kun specifa respondeco pri kunordigo de ĉiaspecaj lokaj Esperanto-asocioj cele al faciligo de la kunlaboro. Cetere, ŝajnas preferinda la ne ekzisto, almenaŭ nuntempe, de fakaj asocioj, kies nura funkciado postulas de la movado tro da streĉo kaj laboro. Oni agu pere de komisionoj ene de HEF, kiu tiel akirus pli da prestiĝo antaŭ la koncernaj ŝtataj instancoj.

4 EJO

- 4.1 La tuta administra, kunordiga kaj informa laboro de la Asocio koncentriĝu, laŭ ebloj kaj bezonoj, en la CO.

5 HOMOJ

5.1 Stabanoj kaj oficistoj

- 5.1.1 HEF devas agi ĉiam pli kaj pli profesiece, kaj tiucele ĝi povus jen dungii salajratan personon por plenumi la taskojn difinitajn al la CO, jen akiri al si la servojn de volontuloj. Eble pere de la tielnomata "*Prestación social de los objetores de conciencia*". Krom-sekretario, necesas disponi ankaŭ subsekretarion.

5.2 Estraranoj

- 5.2.1 Ĉiu estraro "respondecu" pri fiksa bone difinita tasko, laborante surbaze de klare formulita kaj interkonsentita plano (ĉu 4-jara?).

5.3 Delegita Reto

- 5.3.1 En Malago HEF devas fari la unuajn necesajn paŝojn por la kreado de Reto de komisiitoj, kiuj helpas la asocion ĉe antaŭdifinitaj taskoj.

5.4 Individuaj Membroj

- 5.4.1 HEF devas pligrandigi la nombron de ĉiukategoriaj membroj, per konvinka kampanjo (ĉefe direktita al eksmembroj kaj aliaj esperantistoj). Aparte necesas por ĉi celo ŝajnas la kunlaboro de la Reto de komisiitoj.

- 5.4.2 La kotizojn oni klopodu enspezi perbanke, aŭ, almenaŭ, pere de la HEF-komisiito en la regiono.

La interna ideo de Esperanto kaj la Homaranismo

1. Kial Zamenhof kreis kaj disvastigis Esperanton?
2. Ĝia interna ideo kaj sekve la homaranismo.
3. Malsukceso de la homaranismo.
4. Post cent jaroj: Materiala monduiĝo, sed ankoraŭ ne homarunuiĝo.
5. La civilizacia krizo de nia tempo.
6. La atombombo signalas du civilizaciajn epokojn, tiel same kiel estis la malkovro de la fajro kaj en la Neolitiko la apero de la agrokulturo kaj bredado.
7. Eĉ estas la minaco de pereigo de la homaro, tiel same, kiel malaperis la dinosaŭroj. Tio signifos la fiaskon de la homa menso en la vivevoluo.
8. Urgas la unuiĝo de la homaro, sed la homoj ne komprenas la gravecon de nia tempo kaj pensas pri nur partikularismoj.

9. Neniu movado entreprenas tiun taskon kaj tio ne povas fariĝi per kiu ajn potenco nek per kiu ajn nacia lingvo, ĉar tio estos imperiismo. (La angla lingvo taŭgas por la scienco, la tekniko, la komerco, la turismo, ktp., sed ne servas por unuigi la homaron.)

10. Nur per lingvo neŭtrala pri imperiismo povas esti farata tiu tasko.

11. La esperantismo delasos esti romantikisma idealismo por fariĝi devo kaj de ĉiu kaj de ĉiuj.

12. La esperantismo devas fariĝi tiu vasta movado por enkonduki tiun universalan civilizacion kaj kune kun la disvastigo de Esperanto kiel dua komuna lingvo por ĉiuj, povos esti plenumita: *La popoloj faros en konsento / unu grandan rondon familian.*

Giordano Moya

Esperanto en la Politiko kaj la Politiko en Esperanto

1. Oni devas analizi, aŭ almenaŭ diskuti, kio estas la politiko. Kaj ni dividu ĉi tiun punkton en la jenaj konsideroj:
 - a. Ĉu la politiko estas necesa?
 - b. Ĉu la politiko estas bona aŭ malbona por la socio?
 - c. Ĉu iu kapablas vivi sen politiko?
2. Nu, spite al tio, ĉu en la antaŭa punkto, la ĝenerala opinio estas favora aŭ malfavora al politiko, nepre oni devas akcepti, ke la politiko estas grava en la vivo de ĉiu homo.
3. Do, ni troviĝas antaŭ la realo; la politiko ekzistas, ĉu Esperanto povas resti for de io tiom influa, kiom estas la politiko en la disvolviĝo de ĉiu socio?
4. Aparte de la plej diversaj kaj malsamaj opinioj, nepre ni devas akcepti, ke la politiko tuŝas Esperanton.

5. Nun ni devas iomete paroli, almenaŭ iomete, kio estas Esperanto.

6. Spite al kiu ajn konsidero, al kiu ja rajtas ĉiu esperantisto, nepre oni devas akcepti, ke esperanto estas parto en la vivo de ĉiu homo. (Ni akceptu Esperanton kvazaŭ jam triumfinta).

7. Nu, jen Esperanto triumfinta, kaj ĝiaflanke aŭ paralele, jen la politiko, kaj la demando estas, ĉu Esperanto povas aŭ povus vivi sen, aŭ en, la politiko?

8. Estas evidente, ke la celo de Esperanto estas servi al la homaro, por ke la homa estaĵo estu pli feliĉa.

9. Kiamaniere ni povas atingi tiun celon, se ni flanken metas la politikon, kio ja estas la precipa faceto de la homa kunvivado?

10. Estas evidente, ke multaj

gesamideanoj rifuzas la politikon en la Esperanto-Movado.

11. Ĉu oni povas atingi la venkon de Esperanto en la vivo de la homaro, flanke de la politiko?

12. Nu, se ni akceptas la politikon en Esperanto aŭ inverse Esperanto en la politiko, kia estus la rolo de Esperanto?

13. Esperanto estas perilo por interkompreniĝo laŭ lingva vidpunkto, ĉar estas evidente, ke se la Esperanto-Movado celus alian rolon en la socio, Esperanto sendiskute fariĝus politika organizo.

14. Se Esperanto estas uzata en la politiko, sendube ĝi estus tre favora fakto por solvi multajn problemojn, kiuj devenas de la lingvaj konfliktoj kaj kiuj ofte okazigas tre delikatajn situaciojn en la socia kunvivado.

15. Apliki Esperanton en la politiko ne signifas, ke ĉiu esperantisto devas anonci sian politikon tendencon.

16. La neŭtraleco de Esperanto nepre devas ekzisti en iuj Esperantaj Institucioj, ekzemple la Akademio de Esperanto. Organizoj kiel UEA povas ankaŭ resti en la neŭtrala kampo, sed nepre apoganta kaj defendanta la homajn rajtojn, eĉ se tiuj homaj rajtoj en iuj aspektoj estas diskutablaj. Neŭtraleco povas ekzisti en ĉiu Esperanto-grupoj kies membraroj tion decidis.

17. Esperanto pli malpli estas akceptata en ĉiu religio kaj eĉ de ateistoj, kial ne en la politiko?

18. Kiam ni tiom fanfaronas, kiam iu grava politikisto sin anoncas favora al Esperanto? Ĉu plaĉus al vi ke Esperanto estus uzata en la Unuiĝintaj Nacioj?

19. Ĉu la politiko pliboniĝos se Esperanto estus uzata en la politiko?

20. Kiam tiom oni parolas pri ekonomio, ĉu Esperanto, vere aplikata en la politiko, ne signifus grandan monŝparon?

21. Iuj esperantistoj pensas, ke Esperanton devas uzi nur honestaj personoj. La

demando estas, kiu estas honesta? Ĉu la politikistoj estas malhonestaj? Kia fakto jam estas la opinio ĝenerala?

22. Kaj grava kialo estas: ĉu Esperanto sin sentos triumfanta, sen sukcesi en la politiko?

23. Eĉ se konstanta ripetado, la esperantistoj devas akcepti, ke Esperanto, kiel lingvo, estas grava parto de la ĉiutaga vivo.

24. Ĉu la politiko helpas aŭ malhelpas la Esperanto-Movadon? Sendube en iuj kazoj, la politiko helpas la aplikadon de Esperanto, kaj en aliaj kazoj, iuj grupoj kun forta naciista tendenco rifuzos Esperanton, kiel ion kio penetras malfavore en iliajn vivkonceptojn.

25. Ni esperantistoj ne devas rigardi la politikon kiel ion malbonan aŭ kontraŭ Esperanto.

26. Estas evidente, ke la akcepto de Esperanto en la politiko kreigos grupojn antagonismajn en la vivo de la homaro. Sed nepre ni devas akcepti, ke Esperanto ne estas la solvo por ĉiuj sociaj problemoj.

27. Ĉu Esperanto unuigos ĉiujn homajn estaĵojn? La respondo estas ne, absolute ne!

28. Por ke Esperanto estu la pacilo inter la homaro, estas bezonataj multaj alĝustigoj kaj justigoj sociaj. Kiam la socio kapablos solvi ĉi tiujn eternaj problemojn, la disvastigo de Esperanto eniros la ĝustan vojon. Intertempe, la Esperanto-Movado nur povas kunhelpi por solvi la menciitajn problemojn.

29. Do, la tasko de la esperantismo hodiaŭ estas labori kaj kunlabori en ĉiuj aspektoj de la socia vivo, eĉ se iuj el tiuj aspektoj ne plene plaĉas al ĉiu esperantisto.

30. La Esperanto de la *bonan tagon*, de la poŝtmarka kolektado, de la rideto kaj de la personaj informoj pri la sanstato aŭ demandoj pri la vetero neniam triumfigos Esperanton, kaj pli frue aŭ malfrue ĝi alvenos al kompleta fiasko.

Esperanto, la fantasta lingvo

Esperanto, kune kun la angla, estis honora gasto ĉe FANCON 94, dudeka kongreso de la italaj sciencfikciuloj, okazinta fine de aprilo en Courmayeur (Aosta Valo).

La ĉefaj tiuĝenraj italaj eldonistoj, verkistoj, tradukistoj, desegnistoj kaj kolektistoj, sekvis kun aparta intereso la prelegon "*Esperanto, la fantasta lingvo*" prezentitan de Liven Dek (Miguel Gutiérrez Adúriz) en Esperanto kun samtempa tradukado.

En la kongreso prezentiĝis la itallingva libro "*La lingua fantastica*" (eldonejo Keltia, Aosta), kiu konsistas ĉefe el la italigo de dudeko da esperantaj originalaj rakontoj, de William Auld, István Nemere, Georgo Kamaĉo, Konisi Gaku, Liven Dek, Arnoldo Águila, Csaba Finta, Higinio García, Bernard Golden, Harry Harrison, Mihail G. Kortkov kaj Pekka Virtanen. Nu, certe bela bukedo el la plej interesaj sciencfikciaj noveloj aperintaj lastatempe en nia lingvo, al kiuj aldoniĝas en paralelaj tekstoj, esperanta kaj tradukita, 120 versoj el la eksterordinara verko de Abel Montagut "*Poemo de Utmod*". La 310-paĝa libro, tre kompetente redaktita de Giulio Cappa, estas plenplena de bonegaj desegnoj speciale faritaj de la plej renomaj italaj desegnistoj, kaj malfermiĝas per entuziasma enkonduko de Harry Harrison, certe unu el la plej konataj anglalingvaj aŭtoroj de sciencfikcio, kaj, kiel sciate, bona esperantisto.

La plejmulto de la kelkcenta partoprenantaro de FANCON 94 posedas la libron, kaj eblas do aserti, ke la ĉefa celo de la eldonaĵo -t.e. sciigi al la itala ascienfikcia mondo, ke Esperanto ekzistas, vivas kaj viglas- jam estas atingita.

Tamen jen, al tiu senduba sukceso, oni devas aldoni alian ne malpli gravan fakton, tio estas ke, laŭ la vortoj de Michela Lipari (Estrarano de UEA pri Kulturo), la itala movado havas de nun je sia dispono novan tre belaspektan nacilingvan varbilon.

Kompreneble ni, la organizantoj de la 53a Hispana Kongreso de Esperanto, ne volis fordormi la okazon kaj invitis la eldoniston de la librokolekto Sferoj, nian samlandanon Miguel Gutiérrez Adúriz (Liven Dek), prezenti en Malago al la hispana samideanaro la prelegon, kiun li faris en FANCON 94.

Verkita por ne esperanta publiko, tamen tiu prelego ne tuŝas la jam trivitan temon "kio estas Esperanto". Fakte, ĝi konstruiĝis en simpla maniero kun la celo altiri la atenton de la sciencfikciema aŭskultantaro de FANCON 94.

Nu, kvankam Esperanto esence rolas en la prelego, tio ne okazas rekte, sed pere de diversaj aludoj kaj la prezentado de pluraj faktoj, multfoje ne konataj de la ĝenerala publiko, kaj foje eĉ ne de la esperantistoj mem!

Certe, la prelego de Liven Dek montriĝos interesa ankaŭ por ni, esperantistoj, kaj, sendube, ĝi helpos nin havi pli klaran bildon pri la rilatoj ĝis nun ekzistantaj inter nia lingvo

kaj tiu literatura ĝenro nomata "Sciencfikcio".

1. Jam komence de la prelego, la verkisto faras al si la du jenajn demandojn: "Ĉu vere la lingva problemo estas afero absolute neebla, nerealigebla, sciencfikcia? Kio do respondas al tio la sciencfikcio?" Kaj, kompreneble, li tuj klopodas respondi per interesa esploro de la plej tipaj verkoj de la sciencfikcia ĝenro, bazinte sin sur antaŭa esploro farita de la tre kompetenta esperanta verkisto kaj eseisto Bernard Golden.

2. Iom post iom la prelego malkovros por ni diversajn faktojn foje ne tro konataj. Ekzemple: multaj famaj sf-verkistoj uzis Esperanton aŭ aludis ĝin en siaj verkoj. Kelkaj el ili lernis la lingvon kaj eĉ rigardis au ankoraŭ rigardas sin esperantistoj. Kion diri, ekzemple, pri unu el la iniciatinto de la sciencfikcia ĝenro Jules Verne, kiu estis eĉ honora prezidanto de la E-klubo de Amiens?

9. En la prelego, kiu, ni memoru, estas adresita al ne esperantistoj, prezentiĝas, kiel plej fantasta, fakto absolute natura por la normala parolanto de la Internacia Lingvo, nome: la ekzisto de sf-verkoj originale verkita en esperanto.

12. Flugrigardo al la sf-verkaro ekzistanta en nia lingvo konigos al ni la ĉefajn aŭtorojn kaj verkojn kreitajn de nia kulturo en la kadro de tiu aparta ĝenro.

14. Ĉu la renkonto kun la nuna situacio, liveros al ni pli koncizan rigardon pri la agado de Grupo Nifo, kies modesta sed persista eldonado motoras la evoluon de ĝenro, en kiu la Esperanto-komunumo, feliĉe, kapablas ne postresti sed, eĉ foje, superi aliajn lingvogrupojn.

17. Fine, la projektoj de Grupo Nifo por estonteco, kiu anonciĝas vere fekunda kaj plena da sukaj fruktoj, kun la apero de tute nova libro-kolekto plene dediĉota al la traduka branĉo.

19. Entute tre interesa renkonto kun fako de nia kulturo, kiu lastatempe montris sin aparte vigla en kaj ekster la limoj de nia kara lingvokomunumo.

21. Havu do agrablan kaj instruan aŭskultadon.

Miguel Gutiérrez Adúriz

Pri la esperantaj supersignoj

Konsideriĝas la fonetika alfabeto de Zamenhof (po unu fono, unu litero, kaj unu signo) kaj citiĝas aliaj dum la E-a historio; tiuj estas: la X-alfabeto (UK de Kopenhago, 1962), la *Krom-alfabeto* por komputoroj, la alfabeto de Kubacki, kaj la *universala* de Walter Yung. Studiĝas kelkaj problemoj pro la supersignoj, citante ĉiujn de la Fundamento, de Albert Lienherdt, kaj de aliaj. Studiĝas kelkaj proponoj kiel solvo, ankaŭ ĉiun de Zamenhof kaj de Lienherdt, O.E.O., Kubacki, NOVO (el Rotterdamo), AEIOU (de Tuluso) kaj mia propono, montrante tabelon pri ĉiuj.

d-ro Ludoviko Ojer Celigueta

Esperanto kaj la laboristaro

1. Esperanto en la diversaj sociaj tavoloj.
2. Strategioj, novaj metodoj de varbado. La realo estas, ke ni ne progresas.
3. Tro da espero en la varbado de la intelektularo aŭ altranguloj.
4. Kiel bazon, la homo deziras plialtigi sian kulturon, por plibonigi sian ekonomian situacion.
5. La pordoj por Esperanto, en ĉi tiu socia situacio, iom post iom malfermiĝos, ĝis la socio serĉos kaj trovos pli favorajn vivkondiĉojn. Kompare kun la milionoj da laboristoj ekzistantaj, la laboristoj esperantistaj estas sensignifaj.
6. Eble antaŭ la dua mondmilito ekzistis certa entuziasmo en la laboristaro por Esperanto. Oni devas rimarkigi, ke tiam estis epoko de espero, idealoj kaj lukto.
7. Nepre sen forta partopreno de la laboristaro, neniam venkos Esperanto.
8. La laboristaro estas la kreanto, realiganto de ĉio, do, ankaŭ ĝi estos la vera motoro por sukcesigi Esperanton.
9. Oni devas montri al la laboristaro la avantaĝojn de la Zamenhofa Lingvo.
10. Esperanto uzata en la laboristaj hejmoj. Regule parolata de la popolo.
11. Kiam surstrate ofte oni aŭdos paroli Esperanton, la politikaj respondeculoj nepre oficialigos ĝin.
12. Kiajn rimedojn trovi por interesigi la laboristaron pri Esperanto?
13. La vivo kolektiva hodiaŭ apenaŭ ekzistas, ĉiu agas por si mem. Esperanto estas lingvo komuna.
14. Ĉu la laboristaro interesiĝas pri la Internacia Lingvo?
15. La laboristaro devas scii, kio okazas, sen perantoj, en aliaj laboristaj medioj el kiu ajn lando. Esperanto estas la nura instrumento tiucela.
16. La laboristoj devas kontentiĝi, per informado de la grandaj internaciaj informaj agentejoj.
17. Ne forgesu, ke ĉiuj informmedioj (televido, gazetaro, radio) troviĝas en la manoj de la kapitalo.
18. Nuntempe la monopoloj kaj ceteraj konzernoj jam elektis la anglan lingvon.
19. Esperanto estas la granda defio de la laboristaro, se ĝi ne deziras resti for de la komunikado, en nia moderna vivo.
20. La lingva diverseco ankaŭ estas baro inter la laboristaro kaj ofta fonto de konfliktoj.
21. La laboristaro ankaŭ devas atenti pri la ekonomio. La uzado de komuna lingvo estus grandega ŝparo. Ekzemple, ĝia apliko en la Nova Eŭropo.
22. Diskriminacio en la lernado de fremdaj lingvoj. Ĉiam la laboristaro restas en malpli favoraj kondiĉoj, inkluzive en la universitato.
23. La nuna laborista situacio, kun tiom granda senlaboreco, sendube ne prezentas stimulon al la laboristaro, kies unua celo estas la prizorgado de la familio.
24. La lingvo en la internaciaj monopoloj, kiuj fakte estas la kontrolantoj de la ekonomia mondo.
25. Resume Esperanto estas lingvo favora al la laboristaro. La problemo estas, kiel interesigi ĝin.
26. Eble nia celo devos esti al la sindikatoj. Estas sindikato, en kies statuto troviĝas regulo por la scio de Esperanto, sed neniu atentis pri ĝi.

conferencia = 200 000 pts

Colocar 5000 por curso
y entregar material

Instruado

Unificar tareas

Unu el la plej gravaj flankoj en la disvastigo de Esperanto estas sendube la instruado. La disvastigo de la naciaj lingvoj dependas de la plimultiĝo de la loĝantaro, tamen la kresko de Esperanto baziĝas nur sur la sukceso de ties instruado. Tial do unu el la prioritatoj de Hispana Esperanto-Federacio devas esti la iom-post-ioma raciigo de ĉi agadkampo.

Nepras kiel eble plej vasta kono de la ĝisnunaj lernosistemoj, por starigo de ĝustaj konkludoj kaj propono de la farendaj taskoj.

Tiu temo intime rilatas al lernomaterialoj, vortaroj kaj informiloj, kaj tiusence eblas sugesti jenajn paŝojn:

- ieudi →
- a) Kompili liston de disponeblaj/aĉeteblaj lernolibroj, vortaroj kaj informiloj, eble eĉ de elĉerpitaj eldonaĵoj. → komitatis. Sendi al Co por Fakro
 - b) Aranĝi enketon a /kaj forumon por kolekti informojn / opiniojn de kursgvidantoj pri utilo kaj mankoj, de la kompilita materialo. Ĉi-ĉele rekomendindas la verkoj "Metodiko en la Praktiko" de Zs. Barcsay, kaj "Metodiko de la Esperanto-instruado" de Rudolf Rakuŝa.
 - c) Starigi komisionon, kiu pristudu la eblecon adapti alilandajn kursojn. Ekzemple: la "Zagreba metodo", jam en manuskripta formo, aŭ "Jen nia mondo" de Wells, kiun eblus uzi kiel perkoresponda kurso.
 - Reti →
 - ĉ) Esplori ĉu ekzistas novaj manuskriptoj de lernolibroj adaptitaj al la nunaj modernaj viv-cirkonstancoj, ekzemple "rapidaj metodoj".

Sed, tiu kampo ankaŭ rilatas al la situacio de la Esperanto-instruado kaj de diplomoj pri lingvo-kapablo. Do, niaj tiusencaj bezonoj ŝajne estas:

- a) Reeldoni, se konvene, malnovajn lernolibrojn ŝanĝante laŭnecese ilian grafikan aspekton, farante ilin pli modernaj kaj allogaj.
- b) Eldoni pli modernajn lernolibrojn adaptitajn al la nunaj bezonoj de niaj grupoj (Miguel Gutierrez, Georgo Kamacho, Marcos Cruz...). Tiusence ni pristudu la oferton de s-ro Miguel Gutierrez cele al la eldono de nova lernolibro, verkita de li, kune kun gvidlibro por la instruado de tiu metodo.
- c) Oferti kursojn kiel eble plej profesiecajn (pagatajn), ne nur en niaj sidejoj, sed ankaŭ en kulturaj asocioj kaj lernejoj. Pritakso de lastatempaj spertoj pri ĉi temo.
- ĉ) Oferti perkorespondan kurson, kiu estu alloga, grafike altkvalita, kun kasedoj ta gaj kaj

kun internacia voĉaro. Ĝin ni diskonigu kiel eble plej larĝskale per pagataj anoncoj, flugfolioj, varbiloj, k.s. La kunordiganto de tiu, nove kreita aŭ tradukita, perkoresponda kurso povus esti Antonio Valen. Ekzistas proponoj, ke tiu kurso estu la konata "*Jen nia mondo*" de Wells; tamen, tiuokaze, HEF devas trovi tradukonton.

- d) Adapti la elektitan perkorespondan kurson por ĝia eventuala uzo ĉe radio, same kiel oni jam faris en Britio rilate al "*Jen nia mondo*".
- e) Apogi, laŭkonvene, la TV-kurson preparatan de Internacia E-Instituto (Nederlando), tamen postulante ioman intervenon, eble per la kunlaboro de hispano en la projekto (Georgo Kamaĉo).
- f) Organizi seminariojn pri instruado, cele al pliperfektigo de niaj metodoj, plikapabligo de niaj instruistoj, kaj ĝenerala interŝanĝo de spertoj. Ĉu eble en Madrido, por profiti kaj la ejon de HEF kaj la fakton, ke la hispana ĉefurbo situas centre de la lando?
- g) Fari la necesajn paŝojn por ke niaj lernolibroj kaj vortaroj estu disvendataj en kiel eble plej multe da magazenoj kaj librejoj. Ĉu HEF fariĝu eldonanto, distribuanto...? (Komisiito esploru la eblecojn). Kompreneble, la plej bona sistemo por surmerkato de niaj kursoj estus kontrakto kun kiel eble plej grava firmao, kiu okupiĝus pri la eldonado kaj disvendado de la tuta lernomaterialo (eble, per kompromiso de forta aĉeto / garantio flanke de la movado).
- ĝ) Kompili informon pri la ebleco de oficiala instruado de Esperanto en ŝtataj instancoj, Ekzemple ĉe la nomataj *CEP*-oj.
- h) Informi la esperantajn instruistojn pri la ebleco disponi jam preparitan dokumentaron por peto de kursoj ĉe oficilaj kaj neoficilaj eduk-centroj.
- ĥ) Pretigi programon por la eventuala instruado de Esperanto ene de la Ĝenerala Baza Edukado (EGB). Tiusence ni pristudu la malneton ofertitan de s-ro Miguel Gutiérrez.
- i) Kolekti ĉiujn informojn kaj menciojn pri Esperanto aperintaj en la Stata Oficiala Bulteno [BOE], eĉ se tiuj ne rekte rilatas al instruado.
- j) Eblecoj kaj ŝtupoj pri rekono / rajtigo de diplomoj pri Esperanto.
- ĵ) Eldoni pli da informa materialo en ĉiam pli moderna vesto, aldonante al "*El Esperanto*" de Pierre Janton kaj "*El Esperanto: fenomeno de la comunicación*" de W. Auld, la novan gvidlibron verkitan de Antonio Valén.

Jen sufiĉa materialo por diskutado kaj laboro. Pri la koncernaj manuskriptoj kaj proponoj parolos, kompreneble, la koncernatoj.

Listo de Kongresanoj

- 1 Andrés Martín González
 2 Bienvenida Tovar Tovar
 3 Augusto Casquero de la Cruz
 4 Alicia Ballester Torregrosa
 5 Jesús Miguel García Iturriz
 6 Rafael Ruiz Criado
 7 Ángeles Martínez Liébana
 8 Hispana Esperanta Fervojista Asoc.
 9 Juan Fernández
 10 José Ivern Mas
 11 M^a Julia Cacho Ramírez
 12 José Climent Grañana
 13 Magdalena Royo Cruellas
 14 Dolores Egea Estañ
 15 José M^a Bernabéu Franco
 16 María Ferigle Danti
 17 Luis Serrano Pérez
 18 Vicente Hernández Llusera
 19 Félix Gómez Martín
 20 Angel Mañero González
 21 Giordano Moya Escayola
 22 Dolores Teixidó Melero
 23 Luis Ojer Celigueta
 24 Juan Antonio Giménez García
 25 Julio Herrero Segura
 26 Paqui Corrales Guerrero
 27 Ernesto Picasso Gallego
 28 Ketí Hurtado Márquez
 29 Ángeles Salazar Blázquez
 30 Luis M^a Hernández Izal
 31 Teresa Massana Ráfols
 32 José M^a Galofré Domingo
 33 M^a Carmen Piedrafita Carpena
 34 Kultura Asocio Esperantista (KAE)
 35 Andaluza Esperanto Unuiĝo
 36 M^a Pilar Gyarre Villoria
 37 Antonio Marco Botella
 38 María Moreno Fernández
 39 Pedro Ángel León
 40 José Fco Martín del Pozo
 41 Antonia Lapuerta Palacios
 42 Alejandra Lapuerta Palacios
 43 Francisco Cabezas Jiménez
 44 M^a Pilar Sancho Rebullida
 45 Salomé Sancho Rebullida
 46 Conxita Soterias Bosch
 47 Cecilia Corbella Bonell
 48 Herminia Gil Álvarez
 49 Lourdes Molina Luna
 50 Juan Martínez Mauri
 51 Ernest Roca Genescá
 52 Eugenio de Jorge
 53 María Jesús Calvo
 54 José Cavia Aedo
 55 Elisa Pellejero
 56 Stana Dimitrova Georgieva
 57 Jesús Raposo Montero
 58 Salvador Aragay Galvany
- Armengual de la Mota, 33, 4^a D, 29007 Málaga
 Armengual de la Mota, 33, 4^a D, 29007 Málaga
 Avda de Burjasot, 29, Esc. A, 8^a, 31, 46009 Valencia
 Avda de Burjasot, 29, Esc. A, 8^a, 31, 46009 Valencia
 Negurigane, 3-28, 48490 Lejona (Vizcaya)
 Plaza Roca i Pi, 1-1^a-1^a, 08912 Badalona (Barcelona)
 Plaza Roca i Pi, 1-1^a-1^a, 08912 Badalona (Barcelona)
 Apartado 15027, 08080 Barcelona
 21 Rue Henri Matisse, 66000 Perpiñán, P.O. Francia
 Tajo, 52-54, 3^a-2^a, 08032 Barcelona
 Tajo, 52-54, 3^a-2^a, 08032 Barcelona
 Pujadas, 460, 1^a-3^a, 08019 Barcelona
 Avda Onze de Setembre, 59, 08208 Sabadell (Barcelona)
 General Primo de Rivera, 8, 03360 Callosa de Segura (Alicante)
 General Primo de Rivera, 8, 03360 Callosa de Segura (Alicante)
 Font Nova 32, 08202 Sabadell (Barcelona)
 Font Nova 32, 08202 Sabadell (Barcelona)
 Avda Onze de Setembre, 59, 08208 Sabadell (Barcelona)
 Corbeta, 8-5^a A, 28042 Madrid
 Guillén de Castro, 129-2^a, 46008 Valencia
 Balmes 38, 08225 Terrassa (Barcelona)
 Balmes 38, 08225 Terrassa (Barcelona)
 Apartado 61018, 28080 Madrid
 Pz. Pintor Segrelles, 1-B-19^a, 46007 Valencia
 Jacinto Benavente, 25-4^a-B, 29014 Málaga
 Jacinto Benavente, 25-4^a-B, 29014 Málaga
 Fernández Shaw, 45, 29017 Málaga
 Camino de Suárez, 71 (A) 5^a H, 29010 Málaga
 Rosa, ed. Jaén, 1-2^a D, 29010 Málaga
 Dr. Zamenhof, 12, 08739 Sant Pau d'Ordal (Barcelona)
 Dr. Zamenhof, 12, 08739 Sant Pau d'Ordal (Barcelona)
 Canonge Joncar 122-letra D, 08208 Sabadell (Barcelona)
 Canonge Joncar 122-letra D, 08208 Sabadell (Barcelona)
 Montseny 5-1^a, 08208 Sabadell (Barcelona)
 Apartado 864, 29080 Málaga
 Avda Compromiso de Caspe, 27-29 9^aC 50002 Zaragoza
 Avda Compromiso de Caspe, 27-29 9^aC 50002 Zaragoza
 Murla, 5-8^a, 46006 Valencia
 Murla, 5-8^a, 46006 Valencia
 Apartado 5184, 29080 Málaga
 San Vicente Mártir, 23-8^a, 50008 Zaragoza
 San Vicente Mártir, 23-8^a, 50008 Zaragoza
 Avda Eugenio Hermoso, Bq.C-1, 1^aB, Apartado 431, 06800
 Mérida (Badajoz)
 Plaza Amazonas, 2, 1^a, 2^a, 50012 Zaragoza
 Plaza Amazonas, 2, 1^a, 2^a, 50012 Zaragoza
 Puignovell, 56, 08221 Terrassa (Barcelona)
 Blasco de Garay, 62, 1^a-1^a, 08224 Terrassa (Barcelona)
 Lausana, 5-3^a C, 50007 Zaragoza
 La Peña 28, 14720 Almodóvar del Río (Córdoba)
 Barrio Santa Rosa, 69-Bitem, 43510 Tortosa (Tarragona)
 Dr. Ullés, 113, 08224 Terrassa (Barcelona)
 Enrique Granados, 52-4^a C, 08330 Premià de Mar (Barcelona)
 Enrique Granados, 52-4^a C, 08330 Premià de Mar (Barcelona)
 Avda Meridiana, 252-4^a-1^a, 08027 Barcelona
 Avda Meridiana, 252-4^a-1^a, 08027 Barcelona
 Car Simeon 243 A/19, 1309 Sofia (Bulgaria)
 Bachiller 2-4, 46010 Valencia
 Bassegoda, 40-3^a-1^a, 08028 Barcelona

superinquiri
 de jomtej

- | | |
|--|--|
| 59 Faustina Martínez Guillén | Correu, 41, 08800 Vilanova i la Geltrú (Barcelona) |
| 60 Josefa Martínez Guillén | Corsega, 539-1 ^a -2 ^a , 08205 Barcelona |
| 61 Mercedes Zarabozo Rodríguez | Leoncio Rodríguez, 39-5 ^o , 38003 Sta Cruz de Tenerife |
| 62 Aurelio Solís Pi | Leoncio Rodríguez, 39-5 ^o , 38003 Sta Cruz de Tenerife |
| 63 Luis Hernández García | Avda Ramón y Cajal, 12-2 ^o C, 47011 Valladolid |
| 64 M ^a Rafaela Uruña de Hernández | Avda Ramón y Cajal, 12-2 ^o C, 47011 Valladolid |
| 65 Manuel Manteca López | Avda de Andalucía, 21-8 ^o A, 29002 Málaga |
| 66 Esteban Benedí | Valle Gistain, 10-4 ^o D, 50015 Zaragoza |
| 67 Concepción Golet | Valle Gistain, 10-4 ^o D, 50015 Zaragoza |
| 68 Eduardo Larrouy López | Gordoniz, 29 pral., 48010 Bilbao |
| 69 Carmen Norabuena de Larrouy | Gordoniz, 29 pral., 48010 Bilbao |
| 70 Ana M ^a Molera Urgelles | E. Rubio, 3, 08180 Moià (Barcelona) |
| 71 Sociedad Esperantista de Tenerife | Apartado 53, 38280 La Laguna (Tenerife) |
| 72 Antoni Badia i Planes | Bisbe Meseguer 18-1-3, 25300 Lleida |
| 73 Santiago Mulas Gallego | Alfonso I, 13-1 ^a izda, 33205 Gijón (Asturias) |
| 74 Astura Esperanto-Asocio | Begoña 25, 33206 Gijón (Asturias) |
| 75 Juan Antonio Cabezos Martínez | Avda de la Flota 7-3 ^o B, 30003 Murcia |
| 76 María Martínez Soto | Ramola Pulido 67-3 ^o , Sta Cruz de Tenerife |
| 77 Fernando Arnedo Broto | Félix Burriel, 5-8 ^o D, 50008 Zaragoza |
| 78 Ana M ^a Hernández Lapuerta | Félix Burriel, 5-8 ^o D, 50008 Zaragoza |
| 79 Guadalupe Domínguez Alcaide | Alameda de Capuchinos, 8-5 ^o C, 29014 Málaga |
| 80 Grupo E-o Jozefo Anglés | Apartat 336, 08190 S. Cugat del Vallès (Barcelona) |
| 81 Juan Miras Cruz | Orient 591 ^o -3 ^o 08190 S. Cugat del Vallès (Barcelona) |
| 82 Trinitat García Cobacho | |
| 83 Antonio Alonso Núñez | |
| 84 Miguel Gutiérrez Adúriz | |
| 85 Marcos Cruz Martín | |
| 86 Nicolás Muñiz Alonso | Rivero 62, 1 ^o 33400 Avilés (Asturias) |
| 87 María Luisa Menéndez Díaz | Rivero 62, 1 ^o 33400 Avilés (Asturias) |
| 88 Ángel Figuerola Luque | Víctor de la Serna, 19-7 ^o , 28016 Madrid |
| 89 Juan Miras Cruz | Ciprés, 1-6 ^o -2 ^o 08940 Cornellà de Llobregat (Barcelona) |

90 Carmen Suárez Fernández - CCA

Madrid

9-9
100 Luis Selaf

Milagros
Núñez

El Esperanto como lengua propedéutica

1. Análisis del problema

1.1 Descripción

El aprendizaje de lenguas extranjeras es un grave problema con el que se encuentran actualmente tanto estudiantes como profesionales. Este aprendizaje postula una gran cantidad de horas de dedicación, un enorme gasto económico, tanto para el estudiante como para la administración, y todo ello suele llevar a un fracaso total de dicho aprendizaje, pues un elevado tanto por ciento de las personas que inician el estudio de alguna lengua extranjera nunca llegará a entenderse en dicha lengua, con lo que se habrá conseguido una pérdida total de tiempo y dinero y un sentimiento de frustración hacia dichos estudios, que hará que muchas personas no lo vuelvan a intentar.

Actualmente, en los planes de enseñanza españoles, figura el estudio de una lengua extranjera optativa, según la disponibilidad de profesores en los centros y, pronto, habrá que estudiar una segunda lengua extranjera. Esto se agrava en las comunidades bilingües de España, como por ejemplo Valencia, en la que los estudiantes tendrán que afrontar el estudio del castellano y valenciano, más dos lenguas extranjeras, lo que supone el estudio de cuatro idiomas en total.

1.2 Objetivo de la investigación

La investigación que nos proponemos realizar consiste en ver si el aprendizaje previo de una lengua facilitadora, I.L.O. (Lingvo-Orientiga Instruado = enseñanza de lengua de orientación), en este caso Esperanto, puede mejorar el resultado en el estudio de esas lenguas extranjeras. Parece obvio suponer que, al igual que una buena preparación física de los niños puede hacer que estos tengan un acceso más positivo a la práctica de deportes concretos, un aprendizaje previo de una lengua fácil, lógica, motivadora por su rapidez de aprendizaje, puede sentar las bases en los alumnos para un acceso al aprendizaje de otras lenguas mucho más efectivo, ganando probablemente en la obtención más pronta de una competencia en el manejo de esas lenguas extranjeras, y además ampliando el techo de esa competencia lingüística.

Como estudios paralelos a esta investigación, se está intentando analizar si el estudio previo del Esperanto lleva no sólo una mejora en el aprendizaje de lenguas extranjeras, sino también algún tipo de mejora en otras áreas, tales como las matemáticas, lengua vernácula y de la actitud ante el estudio de lenguas extranjeras.

1.3 ¿Qué es el Esperanto y cuáles son sus cualidades?

1.3.1 Características

El Esperanto es no solamente una lengua más o menos internacional, sino también una idea. Idea de internacionalidad, de comunicación internacional entre hombres y pueblos, de lazo de unión internacional y de amistad internacional.

1.3.2 Valores

El Esperanto como lengua tiene diversos valores:

-es más fácil que las lenguas naturales

- es neutral, sin propósitos de imperialismo o colonización lingüística, política o económica
- es propiedad de todos sus hablantes y no de un grupo étnico
- es lógico, eufónico, flexible
- es bello como idioma

Pero el aprendizaje del Esperanto tiene otros rasgos positivos, a nuestro entender, como pueden ser el facilitar el aprendizaje de otras lenguas, estimular la formación de nuevos conceptos lingüísticos, preparar la mente de forma positiva hacia el estudio de lenguas extranjeras.


1.3.3 Objetivos

Los objetivos de la enseñanza del Esperanto son diversos:

- objetivo práctico: formar en el estudiante la capacidad de hablar esa lengua para usarla productivamente en la transmisión y recepción de información, tanto en forma hablada como escrito
- objetivo educativo: formar en el estudiante durante el proceso de aprendizaje esos rasgos que caracterizan al esperantismo como concepto. El Esperanto, como materia de estudio, debe contribuir a los objetivos generales de culturización dentro del marco en el que tenga lugar.
- objetivos particulares: siendo neutral, su enseñanza facilita la introducción de la idea de estimación recíproca entre naciones y de considerar iguales a las mismas. Por su esencia, el Esperanto está al servicio de la Paz, y sirve perfectamente para educar en el amor y la Paz.

1.3.4 Esperanto como lengua

Según los principios lingüísticos generales, el Esperanto se puede concretar en el siguiente esquema:



Por tanto, el Esperanto sería lengua extranjera viva internacional.

1.3.5 La enseñanza del Esperanto

Desde la creación de esta lengua internacional, empezó su enseñanza. Al principio, casi siempre el aprendizaje era autodidacta. Después se empezó a organizar cursos en asociaciones, colegios, universidades, etc., por todo el mundo.

El objetivo de la enseñanza del Esperanto se quedó durante muchos años en el mismo aprendizaje de esta lengua, sin otros objetivos añadidos.

Pero, poco a poco, se vio que aprender Esperanto tenía otros efectos importantes, como por ejemplo socializar a los alumnos, educarlos en la comprensión internacional y desarrollar en sus mentes las capacidades para el aprendizaje en general.

d. 1.3.6 Propedéutica del Esperanto

Ya desde hace mucho tiempo, hubo pedagogos que pensaron que por medio del aprendizaje del Esperanto habría posibilidad para los alumnos de aprender mejor otras lenguas. El primero fue el profesor Pierre Bovet, el cual antes de la Segunda Guerra Mundial hizo en el Instituto Jean Jacques Rousseau, de Ginebra, experimentos en este sentido.

Desde entonces, muchos expertos han investigado y experimentado sobre este tema. Entre estos se encuentran por ejemplo Helmar Frank, director del Instituto de Cibernética de la Universidad de Paderborn (Berlín), el profesor japonés Fukuda, el también alemán Detlev Blanke, etc.

1.3.7 Tesis doctorales realizadas en relación con el valor propedéutico del Esperanto

Hasta ahora se han realizado más de cien tesis doctorales en todo el mundo sobre temas relacionados con el Esperanto. Muchas de ellas tratan del Esperanto como lengua puente. Podemos destacar entre ellas las siguientes:

- Judit Balogh (Hungría), *Rolo de Esperanto kiel pontlingvo en la instruado de fremdaj lingvoj*
- Xavier Delaunoy (Francia), *Paroli Esperanton, vigliganta aktiveco en la elementa lernejo*
- Terezia Fellegi (Hungría), *Kiel faciligas la lingvo Esperanto la lernadon de la rusa lingvo.*
- Günther Lobin (Alemania), *La propedeŭtika valoro de planlingvojn por la fremdlingva instruado*
- María Mjerczak (Polonia), *Propedeŭtiko de la franca lingvo kaj Esperanto*
- H.G. van der Meer (Holanda), *Al internacia lingvo en la daŭriga baza instruado*
- Lucille E. Whitehurst (EE.UU.), *La valoro de Esperanto kiel ilo por pli bona interkompreno de la angla gramatika strukturo kaj uzado.*
- Elzbieta Gadacsine (Polonia), *Rolo de Esperanto en internacia edukado de altlerneja junularo.*

2 Ventajas del estudio de Esperanto en niños

2.1 Para los alumnos:

- a. El estudio, como juego, de una nueva lengua que sea fácil, fonemática, lógica, les motivará positivamente para iniciar el estudio de otras lenguas extranjeras, que tengan dificultades fonéticas, gramaticales y léxicas.
- b. Por la especial característica de neutralidad del Esperanto, con el objetivo de ser lazo de comunicación entre las personas de todo el mundo, sin objetivos de tipo político, económico, u otros, o de dominio de algunos países o culturas sobre los otros, el aprendizaje del Esperanto, aunque sea breve, motivará a los niños y abrirá sus mentes al contacto con otras culturas y países.
- c. Ahorro de tiempo. El estudio previo del Esperanto parece que acorta el tiempo de aprendizaje posterior de otros idiomas de estudio obligatorio en los colegios. Es una base sólida para la posterior construcción lingüística. La experiencia de un estudio lingüístico agradable en el comienzo será un estímulo muy efectivo para el estudio de otras lenguas. Además, la adquisición de terminologías específicas como la anatómica, la zoológica, la botánica, etc., será altamente facilitadora para las otras lenguas a estudiar, pues la mayor parte de las raíces del esperanto están tomadas del latín, en el cual tienen su origen estos términos.

d. Para las Matemáticas. Los rasgos de logicidad como base de la gramática de Esperanto son un ejercicio ideal para el posterior desarrollo de la lógica matemática en los niños.

e. Desarrollo de sentimientos positivos. El aprendizaje del Esperanto es una aventura que proporciona a los niños profundas satisfacciones. El niño adora los códigos, los alfabetos secretos, los lenguajes misteriosos. Las lenguas nacionales no pueden responder a esos deseos de juego simbólico, porque el tiempo necesario para poder utilizarlas es demasiado largo. Por el contrario, con una lengua en la que cualquier esfuerzo es inmediatamente productivo, el niño progresa con una rapidez sorprendente, y, tras una quincena de lecciones, puede más o menos tener verdaderas conversaciones, lo cual le anima en gran manera. Todo aprendizaje en el cual los progresos son rápidamente constatables da la impresión, importante, de éxito.

f. Comparación con otros alumnos. El niño que tiene esta experiencia encontrará que en el mismo tiempo en que otros compañeros aprendieron una lengua extranjera, él aprendió esa misma lengua, y además Esperanto, lo que le da una cierta superioridad académica en relación a los otros, que para los niños es un gran refuerzo positivo.

2.2 Para los profesores de idiomas del colegio

Enseñar una lengua extranjera a un niño, el cual adquirió previamente una lógica lingüística y una motivación positiva ante el estudio de otra lengua es un ahorro de tiempo, y será útil para trabajar de una manera más agradable y relajada, porque este alumno probablemente comenzará este aprendizaje con una actitud más positiva y facilitadora del mismo.

3. Introducción y justificación

El presente trabajo es el comienzo de una labor de investigación que tiene como objetivo intentar demostrar la hipótesis de que la enseñanza de una lengua de orientación I.L.O. (en este caso Esperanto), previa al estudio en el colegio de lenguas extranjeras, puede ser altamente facilitador de este aprendizaje, consiguiendo al final de los estudios un mayor nivel en la competencia lingüística alcanzada, y una aceleración en el proceso de adquisición de esa competencia por parte de los alumnos.

En este trabajo se va a describir el cómo de la experiencia realizada y el porqué, así como se hará un análisis de los procedimientos utilizados.

Como debido a la larga duración del experimento (dos cursos escolares) todavía no es posible analizar los datos y sacar las conclusiones que confirmen o nieguen la hipótesis, este trabajo es, por ahora, sólo descriptivo de la enunciación del experimento.

Se han recogido datos en los que se miden el nivel de partida de los grupos experimentales y de control, y todos los datos correspondientes al primer año del experimento.

Estos datos no se han analizado todavía por diversos motivos:

a. Por la mortalidad experimental. Hasta que termine el experimento no es conveniente analizar los datos, pues la muestra puede sufrir variaciones a lo largo del mismo.

b. Por los resultados. Hasta el final del experimento no tiene sentido comparar los resultados, pues estos son parciales y sólo el comparar las posibles diferencias que se puedan producir entre los valores de partida y finales de las variables en la muestra nos pueden dar una respuesta a la hipótesis planteada.

En total calculamos que habrá que analizar como mínimo unos 12000 datos, lo cual se

realizará en una siguiente etapa, al terminar el experimento.

4. La hipótesis

La hipótesis de partida para la realización de un experimento al respecto, en este caso comparando por ejemplo dos grupos de niños en el estudio del idioma inglés, el primero de ellos estudiando inglés durante dos cursos académicos, y el segundo estudiando un año Esperanto y el otro inglés, y comparando los resultados finales respecto al dominio del inglés en ambos grupos, sería:

LA UTILIZACIÓN DE ALGÚN I.L.O. (LINGVO ORIENTIGA INSTRUADO = ENSEÑANZA DE ORIENTACIÓN LINGÜÍSTICA), EN ESTE CASO ESPERANTO, A LOS ALUMNOS, PRODUCIRÁ UN POSTERIOR MEJORAMIENTO DE LA RAPIDEZ Y NIVEL FINAL DE COMPETENCIA ADQUIRIDOS EN EL ESTUDIO DE OTRAS LENGUAS EXTRANJERAS.

Podemos enunciar la hipótesis de la siguiente forma:

$$Y = f(X)$$

siendo Y = nivel final de competencia alcanzada en el idioma inglés (variable dependiente)

x = variable independiente aplicada (enseñanza del Esperanto).

Por ello podemos suponer que, para nosotros, Y está en función de X.

La base en la que nos apoyamos para sostener esta hipótesis es que suponemos que una preparación inicial que lleve al desarrollo de unas habilidades lingüísticas puede llevar a un afrontamiento del estudio de lenguas extranjeras habiendo adquirido una lógica lingüística, un conocimiento de universales gramaticales, una preparación simple a la adopción de patrones fonéticos diferentes al propio, un acceso a léxicos diferentes por medio de un sistema de raíces fácilmente adquiribles, y a un hábito de pronunciación, comprensión y expresión de una lengua diferente pero fácilmente accesible, que será paso para la posterior adquisición de una competencia en lenguas más complicadas e irregulares.

Para confirmar o rechazar esta hipótesis se deben cuantificar los resultados finales adquiridos en el estudio de una lengua extranjera (en este caso inglés = V.D.) tanto en los grupos experimentales como en los grupos de control, y estudiarse mediante la comparación entre ambos si la introducción de la Variable Independiente (enseñanza del Esperanto) ha sido la causa de las posibles diferencias que se pueden encontrar entre los grupos.

Como HIPÓTESIS COMPLEMENTARIAS podemos enunciar las siguientes:

HIPÓTESIS B:

LA ENSEÑANZA DE I.L.O. (ESPERANTO) PUEDE PRODUCIR UNA MEJORA EN EL APRENDIZAJE DE MATEMÁTICAS Y LENGUA VERNÁCULA.

HIPÓTESIS C:

LA ENSEÑANZA DE I.L.O. PUEDE PRODUCIR UNA MEJORA EN LA MOTIVACIÓN ANTE EL ESTUDIO DE LENGUAS EXTRANJERAS.

5. El diseño

El presente trabajo de investigación podemos considerarlo dentro de los *cuasi-experimentales*, pues no es posible controlar al 100% todas las variables que intervienen.

En función del número de variables utilizadas, es un diseño *univariado-univariado*, pues utilizamos una sólo V.I. (Esperanto) y una sólo V.D. (inglés), según la denominación ya

definida por John Stuart Mill en 1872, en su *Methods of Experimental Inquiry*. Dentro de esta categoría, el presente diseño es *multigrupo*, con aplicación de distintos valores de V.I. (0 y 1).

El diseño está constituido de la siguiente forma:

1. Medida *pre-test*. Se toman las calificaciones del curso anterior (4º E.G.B.) de todos los sujetos de la muestra. Se establecerán las medias por alumno, por materia en cada alumno, por trimestres de cada grupo, por curso de cada grupo, por curso de cada asignatura de cada curso y grupo. Se compararán las medias de partida de los grupos experimentales y los de control.

2. Durante un año escolar (5º E.G.B.), durante una hora semanal, se enseñará Esperanto a los dos grupos experimentales, y, simultáneamente, se enseñará inglés a los dos grupos de control.

3. Al terminar este año escolar se vuelven a realizar las medidas que se tomaron al principio del experimento como medidas de base o punto de partida. Se compararán los valores obtenidos con los del punto de partida para ver si ha habido un cambio, comparando las medidas de los grupos experimentales con las de los grupos de control, para ver si se han producido diferencias significativas entre ambos.

4. Durante un segundo año escolar (6º E.G.B.) a los cuatro grupos inglés, tanto a los grupos experimentales como a los de control, suprimiendo la aplicación de la V.I. (Esperanto).

5. Al terminar este segundo año escolar, se volverán a efectuar medidas, siendo las de principal interés las medidas de los niveles alcanzados en el aprendizaje de inglés, que es el propósito principal de esta investigación. Se verá si se han producido diferencias significativas en los niveles de los diferentes grupos.

Augusto Casquero

IKEF

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, fondita 1985 (ekde 1994 aliĝinta faka asocio al UEA). Ĉefa celo: akceptigi kaj enkonduki la internacian lingvon Esperanto en komerco kaj ekonomio per praktika uzado de la lingvo.

de Franz Josef BRAUN

Kelkaj pensoj pri IKEF, nia memkompreno, niaj agadoj, spertoj, sukcesoj kaj malsukcesoj

1. La taskaro sur la kampoj komerco kaj ekonomio/ekonomiko estas tiom vasta, preskaŭ senfina, ke estus grandega progreso, se ni povus sukcese prilabori eĉ nur centonon.

Aliflanke la internacia komerco ŝajnas esti regata de la angla lingvo, kiu ŝajne lasas malmultan ŝancon al Esperanto. Sed se oni volas manĝi elefanton, oni ne kapablas manĝi ĝin per ununura gluto, sed nur tranĉaĵetel.

2. Ni devas konsideri, ke ekonomistoj/komercistoj ĉiam pensas ekonomie; ili ne havas liberan tempon, ĉar *tempo estas mono*. Ili ĉiam kalkulas, kiom da mono ili profitas po elspezita monunuvo aŭ ellaborita horo. Se iu afero ŝajnas al ili ja logika sed tamen tro iluzia aŭ malfacile realigebla (ekz. Esperanto), ili preferas la duan, realisman vojon (ekz. la anglan aŭ alian nacian lingvon).

3. Tamen, estas fakto, ke inter niaj konatoj troviĝas entreprenistoj kiuj ĝenerale simpatias por Esperanto, kvankam ili havas nek tempon nek talenton por mem agi. Ni pripensu farigi ilin

sponsoroj (financaj subtenantoj) por nia afero. Por ili taŭgus reklamanoncoj kaj tradukservo.

4. Nia membraro ĉefe konsistas el profesiuloj sur la kampoj komerco kaj ekonomi(k)o. De profesiulo oni rajtas ekspekti *profesiecan* (ne laikan) *labormanieron*; t.e. akurate, precize kaj strategie labori.

5. Ni komercistoj kaj ekonomi(k)istoj devas pensi ekonomie. Mono profito, rendimento kaj produktiveco ne estu malestimataj nocioj por ni (kontraŭe al tia ofta sinteno en Esperantujo)! Ni ĉiam strebu en niaj agadoj pri ĝusta ekvilibro inter elspezo/laboro kaj elspezo/rendimento.

6. Ni estu senlaciaj kaj persistemaj kaj ni ne rezignu pro malsukceso. Eĉ post dek malsukcesoj ni ne rezignu sed ĝoju pri la sekvanta sukceso ĉe la dekunua fojo; kaj post tio ni ree eltenu novajn malsukcesojn. Tamen ni aperu al ne-Esperantistoj serioze kaj ne altrudeme pri nia afero.

7. Ni klopodu per niaj agadoj realigi monan enspezon por la kaso de IKEF aŭ por la E-istaro entute. Taŭgaj objektoj por tio estas ekzemple la supraj agadoj n-ro 3 (reklamanoncoj de entreprenoj) kaj n-ro 5 (negoco inter E-istaj komercistoj).

8. Ĉiu IKEF-membro faru ion -el la agadprogramo '94/95- kio estas por li/ŝi plej facile realigebla aŭ kio rilatas al lia/ŝia profesio, ĉiutaga laboro aŭ hobbio, aŭ kio simple plaĉas al li/ŝi kiel defia tasko.

Ni bezonas kunlaborantojn por *internaj* kaj *eksteraj* agadoj. Mi nomas tri ekzemplojn. Se iu ŝatas lingvistikon kaj havas talenton pri vortkreado, li/ŝi kunhelpu en nia Terminara Sekcio. Tie atendas lin/ŝin giganta tasko, nome esperantigi entute ĉ. 20000 ekonomiajn terminojn. Kiu laboras en venda aŭ aĉeta sekcio kaj kiu estas kontaktema homo, tiu provu serioze sed sentrudeme konvinki siajn partnerojn pri Esperanto kaj sekve uzi la lingvon en sia komercado. Kiu laboras en universitato pri ekonomio kiel profesoro aŭ studento, tiu verku fakajn artikolojn kaj kiel eble plej multe lekciu esperantlingve.

9. Agante tiel ni venkos la obstaklojn ni progresos paŝon post paŝo.

Franz Josef Braun

Prezidanto de IKEF

Centra sidejo:

ĉe Franz Josef BRAUN

Hornisgrindestr. 8

D-77815 Bühl 16, Germanio

Aĉetsekciestro.

S-ro Roland ROTSAERT, Belgio

Financa Sidejo kaj Membrara Administrado

Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge (Belgio)

Librotenisto ĉe Universitato

Redaktora sidejo:

S-ro Daniel KÖNIG

Speyerer Str. 80, D-68535 Neckarhausen, Germanio

Studento pri Ekonomio

D-ro István GETHER, Hungario

Ekonomikisto

S-ro François-Xavier GILBERT, Francio

Direktoro de Komerca Ĉambro

D-ro Marko PICASSO, Italio

Konsilisto pri merkato

S-ro YAMASAKI Seiko, Japanio

Estrarano de kompanio

Revizoro por la financa raporto kaj samtempe UEA-Komitatano delegita de IKEF:

D-ro Gianfranco POLERANI, Italio

Kunordiganto de la Terminara Sekcio de IKEF:

S-ro Hans Wiersch, Germanio

Ĝisnunaj agadoj de IKEF

1. Terminara laboro

Komerca terminaro (Esperanto-versio de *Key words in international trade*, kvinlingva de ICC)

Ekonomio-financo-mono, esperanto-versio de *Economie-Finance-Monnaie*, naŭlingva glosaro de la komisiono de la Eŭropaj Komunumoj.

Nun oni prilaboras *Sindikatan Terminaron*, Esperanto-versio de *Monde du travail et du mouvement syndical*, deklingva glosaro de la komisiono de la Eŭropaj Komunumoj.

2. Verka agado

Ekonomia Bulteno pri Usono, monata raporto pri la evoluo en Usono, de d-ro Goldmann, Usono.

Broŝuroj pri ekonomiaj temoj, de d-ro Bormann (*Konjunkturpolitiko (inter senlaboreco kaj inflacio; Entrepreno (Entreprenistaj strategioj. Priskribo de la entrepreno); Trafiko; Mondkomerco kaj Lingvo*)

Artikoloj pri ekonomiaj temoj en *Monato*, internacia revuo sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo.

3. Praktikaj agadoj

-reklamanoncoj de entreprenoj por *Monato*

-informservo tutmonda *monda merkato*, de s-ro Schubert

-TAKE, Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj, fondita 1993, de s-ro Basso

-*Kiu faras kion*, kvarlingva broŝuro pri produktoj kaj produktistoj en la regiono de Bar le Duc, 1986 kaj 1992, de s-ro Gilbert

-tradukservo etikedservo por firmaoj, de s-ro Ruig

-komercado inter Esperanto-parolantaj firmaoj

-roli kiel interpretisto kaj peranto okaze de akcepto de eksterlandaj delegacioj de ekonomikistoj, ekz. de s-ro Wang Tianyi

-traduko de formularoj por la internacia komerco

-vizito ĉe firmaoj dum la UK-semajno

-senkosta perado de anoncetoj de e-istaj komercistoj, ĉefe el landoj kun pagoproblemoj

-*Ĉinio Aktive*, ekspozicio pri ĉinaj varoj kun Esperanto-simpozio en Oostende, Belgio, oktobro 1991, kun pluraj aktivaj partoprenantoj de IKEF

-gvido de seminario ĉe *Kvinpetalo* en Bouresse, Francujo, pri la celo kiel formi homojn pri Esperanto de d-ro Picasso

-prelegoj pri ekonomiaj temoj de la Eŭropa Unio, de d-ro Cwik

esperantista asocio de la Radikala Partio

"Esperanto" Radikala Asocio



E.R.A.-K.O.D.O.



KunOrdigo por la Demokrata eŭropa kultura integriĝo

Via di Torre Argentina 76 - 00186 Roma - Italio. Telefono +39.6.689791, telefakso +39.6.6545396, telekso 610495 prllfe

Karaj amikoj,

ni povas sinteze aserti ke la lingva kaj kultura superregado estas elsekvo de la politika superregado, kiun hodiaŭ plenumas - favore al plisolidiĝo de la pozicio de la angla lingvo kiel fakta lingua franca (helplingvo), eŭropa kaj tutmonda - tiuj nacioj kaj popoloj de la kvin kontinentoj, kiuj parolas tiun lingvon kaj, ĉefe, Usono. Konsekvence tiuj, kiuj deziras kontraŭstari tiun ĉi tendencon kaj deziras la sukceson de internacia neŭtrala artefarita helplingvo, trovas sin devigitaj - se ili ne volas strebi al nur utopia celo - klopodi por estigi politikan potencon de granda komparebla al tiu de Usono; t.e. politika potenco ege bezonanta, por ekesti, solidajn komunajn bazojn kaj ne nur simplajn intenco-deklarojn.

Ni opinias, ke eble la plej grava ilo, kiu povus doni solidajn bazojn al la eŭropa unuiĝo, estus la adopto, kiel propra lingvo, fare de la Eŭropa Komunumo, de artefarita planlingvo, kia estas Esperanto, ĉar nur ĉi-tia idiomo ebligus al tiu potenco la jenon:

- konfirmi sian politikan kaj kulturan sendependecon;
- samtempe gardi la plurecon de la eŭropaj lingvoj (hodiaŭ minacataj de la progresiva ekspansiado de la angla);
- gardi la plurecon de la eŭropaj kulturoj, kiuj riskus mem malaperi, se estingiĝus la lingvoj, kiuj ilin vehiklas, kaj kiuj ebligas ilian pluvivadon;
- estigi, ĝuste pro la neŭtraleco de tiu lingvo, eventon por ĉiuj ŝtatoj akcepteblan kaj konkrete kunigantan, tiel ke ĝi ebligus al belga civitano, same kiel al hispana, same kiel al greka, prave nomi sin civitano de la Eŭropa Unio.

Tiu ĉi aglinio estas la ununura, kiu povus ja ebligi kvalitosalton en la kultura kreskado de la Esperanto-movado; fakte se ĝi ne havos ankaŭ aŭd-vidan kaj filman kulturproduktadon, la Esperanto-kulturo restus grave kripligita kompare kun la aliaj lingvoj kaj kulturoj, etnaj.

Krome ni volas politike aserti la rajton je la internacia lingvo kiel fundamentan, eksplicitan, memstaran kaj ĉefan rajton, kiel bezonatan antaŭkondiĉon por povi fakte ĝui la ceterajn fundamentajn rajtojn.

La prilingva leĝo, prezentita en Francio la pasintan februaron fare de la Ministro pri Kulturo kaj pri Franclingveco, s-ro Jacques Toubon, estas nur la laŭtempe lasta montriĝo de ŝtato kiu leĝofaras, en lingva sfero, laŭ diskriminacia maniero, plialtigante la rangon de unu lingvo damaĝe al aliaj; tiaj leĝoj kiel tiu ĉi starigas, eĉ kontraŭintence, seriozan barilon al la unuiĝo.

Hodiaŭ estas utopie esperi, ke Eŭropo povos en mallongaj tempoj elekti Esperanton kiel lingvon por la internacia komunikado.

Verŝajne la precipa barilo ne estas la forto de la angla lingvo, kiu fakte larĝmezure jam iel estas helplingvo. La plej granda barilo estas psikologia: t.e. la nekonscia sento, tre disvastigita kaj angordona, ke la utiligo de elpensita lingvo, tute malhavanta historiajn tradiciojn, implicus, kaj je individua kaj je kolektiva nivelo, ĝisradikan "perdon de identeco", kiun la homoj neniel pretas akcepti. La problemo povas unuavide aspekti kiel nesolvebla, sed elirvojo estas proponita de la moderna lingvokibernetiko kaj, specife, de la esploroj faritaj ĉe la Universitato de Paderborn en Germanio, fare de profesoro Helmar Frank; kiel supozeble vi bone scias, tiuj esploroj konfirmis kaj definitive pruvis ke Esperanto konsistigas la plej bonan preparadon al la lernado de ĉiu ajn etna lingvo.

Ni opinias do, ke tiu metodo estas antaŭenigenda almenaŭ en la tuta Eŭropa Komunumo. Tia strategio helpas forigi la ĝisradikan kontraŭecon al la internacia lingvo ĉe tiuj, kiuj kontraŭstaras ĝin kaŭze de la supre dirita "komplekso de perdo de identeco".

Nur propedeŭtika kaj didaktika, kaj do nur provizora, utiligado de Esperanto ne povas estigi similajn malraciajn timojn, aŭ almenaŭ ĝi povas servi por rimarkinde limigi ilin.

Laŭ tiu ĉi aglinio okazis kaj plu okazadas tuta aro da iniciatoj de ni entreprenitaj.

MARTO 1993, ROMO

La Vicministro pri Edukado de la itala Registaro, s-ro Matulli, pozitive respondas al la parlamenta demando de hon. deputito Elio Vito (kunordiganto de la Federista parlamenta Intergrupo pri la lingvo kaj por reformo de la lingvopolitiko) per starigo de ministeria studkomisiono por antaŭenigo de Esperanto. En aprilo aperas la Dekreto pri starigo de la komisiono.

APRILIO 1993, LUKSEMBURGO

Konkludiĝas - per negativa respondo kaj per alsendo de la tuta dokumentaro produktita de la EP pri la problemo de multlingveco - la esperantista Petskribo al la Eŭropa Parlamento, iniciatita de "Esperanto" Radikala Asocio en 1992.

MAJO 1993, ROMO

Sekve de la starigo de la Ministeria Komisiono, ekmoviĝas ankaŭ la Ĝenerala Direktorejo pri Kulturaj Interŝanĝoj de la itala Eduk-Ministerio, kiu invitas respondajn instancojn de Belgio, Germanio kaj Hispanio, eksperimenti Esperanton ĉe 16-17-jaraĝaj geknaboj. La junuloj estos poste invitataj reciproke interŝanĝi siajn spertojn, koste de Italio, en kelktaga "Feria Seminario".

Ni sekvis kaj estas kunordigantaj la iniciaton en la landoj koncernataj de la projekto de la Direktorejo, sed ĝis nun la klopodoj de la esperantistoj de tiuj landoj estis sensukcesaj kaj neniu pozitiva respondo alvenis al la itala Ministerio.

JULIO 1993, SOFIO

La Ĝenerala Konsilio enmetas inter la politikajn prioritatojn de la Radikala Partio la Esperanto-batalon.

NOVEMBRO 1993, PARIZO

La RP organizas manifestacion dum la laboroj de la Ĝenerala Konferenco de Unesko; Italio proponas poresperantan rezolucion kaj delegitaro de la Radikala Partio estas akceptata de reprezentantoj de Unesko: la Ĝenerala Direktoro apogos la proponon en ĝia principo kaj faros sian eblon por doni al ĝi sekvon en la kadro de la Projekto "Linguapax".

NOVEMBRO 1993, BRUSELO

Fermiĝas la ĉapitro malfemita de la rezolucipropono pri Esperanto de la 14a de aŭgusto 1992, iniciatita de Marco Pannella, eŭroparlamentano de la grupo de la "eksterfrakciuloj".

La Prezidanto de la "Komisiono pri kulturo, junularo, edukado kaj informiloj" de la Eŭropa Parlamento, Hon. La Pergola, disdonis al la parlamentanoj membroj de la Komisiono studaĵon pri la Internacia Lingvo.

La okazinta disdono de la studaĵo, menciita en la kunsid-protokolo, povos konsistigi oportunan referencon por la laboroj de la nova elektota parlamento.

DECEMBRO 1993, ROMO

Ĉe la Ministerio pri Edukado eklaboras, prezidate de Hon. Matulli, Vicministro pri Edukado, la ministeria Komisiono pri la Internacia Lingvo. En la sama monato la laboroj de la

Komisiono konkludiĝas per serio da konkretaj proponoj tute favoraj al la enkonduko de la internacia lingvo en la italajn lernejojn.

JANUARO 1994, ROMO

Manifestacio de la Radikala Partio ĉe la Ministerio pri Edukado por ke oni tuj dekretu la aldonon de la internacia lingvo en la elementaj lernejoj.

FEBRUARO 1994, PARIZO

La itala Unesko-Komisiono aprobas la Projekton "Fundapax", ellaboritan de ERA kaj ĝin prezentas al la Ĝenerala Direktoro s-ro Mayor, tiel igante ĝin agpreta.

MARTO 1994, STRASBURGO

Prezentado de kvardek amendoproponoj, subskribitaj de la radikalaj eŭroparlamentanoj, al la programoj "Leonardo" kaj "Socrates" pri profesia edukado.

APRILIO 1994, TORINO

Per la publikigo en la itala Oficiala Gazeto de la modifoj al la statuto de la Universitato de Torino, sub konstanta kaj atentema premado fare de ERA, je la unua fojo en itala universitato estas enkondukita kurso pri Interlingvistiko kaj Esperantologio.

MAJO 1994, STRASBURGO

Manifestacio de la RP, antaŭ la Eŭropa Parlamentejo, subtene al la amendoproponoj prezentitaj de la radikalaj eŭroparlamentanoj al la supre diritaj programoj de profesia edukado.

Sendube tiuj ĉi estas minimumaj rezultoj kompare al la celo, al kiu ni strebas, kaj ĝuste pro tio kaj pro la naturo mem de tiu ĉi batalo, la disvolvata agado restas malviva litero, se ĝi estas farata en unu unuopa lando aŭ fare de naci-nivelaj movadoj.

Male, la "Esperanto" Radikala Asocio, kiel asocio de la Radikala Partio, kiu, en tutmondisma alrigardo al la politiko, estas partio transnacia, povas konsistigi la taŭgan ilon por la atingo de la celoj, kiuj nin kunigas.

Tiucele ŝajnas al ni oportuna proponi al vi:

- pakton de federiĝo inter ambaŭ niaj asocioj kiel unuan paŝon al la konstruado de movado politike luktanta por Esperanto kaj por la atingo de pli granda efikeco kaj traf-kapablo en politiknivela agado, kiel jam faris la Litova Esperanto-Asocio;
- individuajn aliĝojn al ERA kaj al RP, kiel subtenon al la ununura en la tuta mondo partio politika engaĝita, en soleca marŝado, sur la fronto de la rajto je Esperanto;
- konkretan engaĝiĝon pri la baldaŭa okazo, en junio, de la balotadoj por elekto de la Eŭropa Parlamento, dum la kontinenta unuiĝo estas nur surpapera kaj la komuna Eŭropa Merkato, la merkato plej riĉa en la mondo, estas senmovigita kaŭze de la lingva barilo;
- engaĝiĝon por la sukceso de la projekto "Fundapax".

Jam nun antaŭdankante vin,

altestime ni vin salutas

Sekretario *Giorgio Pagano*

Trezoristo *Gianni Betto*

Prezidanto *Andrea Chiti Batelli*

Programo

Tago	Horo	Ĉambro	Aaado
16	12.30	Salono Zamenhof	Malfermo de la Kongresoj
	16.30	Ĉambro Waringhien	Asembleo de prezidantoj de asocioj kaj grupoj
	18.00	Ĉambro E. Privat	Prelego pri <i>Esperantaj supersignoj</i>
	18.00	Ĉambro Jozefo Rodríguez	Kunveno de gelernantoj
17	10.00	Ĉambro Waringhien	Laborkunveno pri Esperanto kaj Politiko
	10.00	Ĉambro E. Privat	Laborkunveno pri Instruado de Esperanto
	10.00	Ĉambro Jozefo Rodríguez	Laborkunveno pri Esperanto kaj Ekonomio
	12.30	Ĉambro Waringhien	Laborkunveno pri Esperanto kaj Politiko
	12.30	Ĉambro E. Privat	Kurso de andaluzaj dancoj
	12.30	Ĉambro Jozefo Rodríguez	Kurso de Esperanto
	16.30	Ĉambro Waringhien	Asembleo de HEF (1a parto)
	18.00	Ĉambro E. Privat	Prelego pri <i>La Interna Ideo de Esperanto kaj la Homaranismo</i>
	18.00	Ĉambro Jozefo Rodríguez	Kurso de Esperanto
18	10.00	Ĉambro Waringhien	Laborkunveno pri Esperanto kaj Politiko
	10.00	Ĉambro E. Privat	Laborkunveno pri Instruado de Esperanto
	10.00	Ĉambro Jozefo Rodríguez	Laborkunveno pri Esperanto kaj Ekonomio
	12.30	Ĉambro Waringhien	Laborkunveno pri Instruado de Esperanto
	12.30	Ĉambro E. Privat	Kurso de andaluzaj dancoj
	12.30	Ĉambro Jozefo Rodríguez	Kurso de Esperanto
	16.30	Ĉambro Waringhien	Asembleo de HEF (2a parto)
	18.00	Ĉambro E. Privat	Asembleo de AEU
	18.00	Ĉambro Jozefo Rodríguez	Prelego pri <i>Esperanto, fantasta lingvo</i>
19		Tuttaga ekskurso	
20	10.00	Ĉambro Waringhien	Laborkunveno pri Esperanto kaj Politiko
	10.00	Ĉambro E. Privat	Laborkunveno pri Instruado de Esperanto
	10.00	Ĉambro Jozefo Rodríguez	Laborkunveno pri Esperanto kaj Ekonomio
	12.30	Ĉambro Waringhien	Laborkunveno pri Esperanto kaj Ekonomio
	12.30	Ĉambro E. Privat	Kurso de andaluzaj dancoj
	12.30	Ĉambro Jozefo Rodríguez	Kurso de Esperanto
	16.30	Ĉambro Waringhien	Asembleo de HEF (3a parto)
	18.00	Ĉambro E. Privat	Asembleoj
	18.00	Ĉambro Jozefo Rodríguez	Prelego pri <i>La laboristaro kaj la Esperanto-movado</i>
21	11.00	Salono Zamenhof	Koncerto
	12.30	Salono Zamenhof	Fermo de la Kongreso
	14.00		Kongresa Tagmanĝo

HEROLDO DE ESPERANTO

Red. Ada Fighiera - Sikorska

Via N. Sandre, 15

I-10078 Venaria R. (Torino), Italio

Torino, julio 1994

Al la Esperanta gazetaro kaj radiostacioj

Bonvolu afable publikigi

La plej ofta sendependa internacia gazeto de la Esperanto-Movado, "Heroldo de Esperanto", en la nuna jaro festas sian 74-jaran datrevenon.

"Heroldo" estis fondita la 14-an de aprilo 1920 en Horrem/Kolonjo (Germanio) de Teo Jung, kaj aperadis ĝis nun kun du solaj esceptoj: en 1936, pro naziaj persekutoj, ĝi mallonge silentis ĝis sia reapero en Nederlando; la dua, pli longa, silentado okazis dum la milita periodo, inter 1940 kaj 1946.

Sub la redaktado de Ada Fighiera-Sikorska, "Heroldo de Esperanto" unue aperis dum 17 jaroj en Bruselo (Belgio) kaj dum 9 jaroj en Madrido (Hispanio); ekde 1988, la gazeto definitive aperas en Torino (Italio).

La ĉefaj karakterizoj de tiu-ĉi plej populara internacia Esperanto-gazeto estas:

- ĝia granda formato, simila al tag-gazeto, kaj la vario de ĝia enpago
- ĝia ofteco (16 numeroj jare)
- la abundeco de ĝiaj informoj, verkitaj en sinteza stilo kaj prezentitaj en multaj rubrikoj pri junularo, kongresoj, feriaj renkontiĝoj, libro-recenzoj, jubileo, mallongaj informoj, Nia Filmo, anoncetoj ktp:
- la specialaj numeroj pri la Universalaj Kongresoj kaj la kalendaro de la Esperantaj kunvenoj kaj renkontiĝoj
- ĝia sendependeco.

Tutjara abono (sendepende de tio, en kiu monato oni pagas) komenciĝas ekde januaro kaj daŭras la tutan koncernan jaron. Duonjaraj abonoj ne estas akceptataj.

Por 1995 ĝi kostas 2700 ptoj Tutnovaj abonantoj, se ili nun pagas por 1995 ricevas la lastajn numerojn 1994 senpage. Anoncetoj (ekz. pri korespondado, interŝanĝado ktp. ĝis 25 vortoj kostas 1000 pts. Anonceto mendita por dufoja sinsekva apero, estas triafoje publikigata senpage. Kaj la abonoj kaj la anoncetoj estas pagendaj al la hispana peranto: Luis Serrano Perez, str. Font Nova 32, 08202 Sabadell (Barcelona). Tel. 727 50 21

Abonu do, kaj estu bonvena en la internacia rondo de pli ol 70 landoj de la legantoj de "Heroldo de Esperanto".

Banco di Roma, Via Alfieri, Torino, conto: A. Fighiera - Sikorska, Heroldo 32108; **Konto ĉe UEA**: hrid - r

Poŝtĉekkontoj: belga, Bruselo 000-0078887-26; germana: Köln 194943-504; itala: Torino 23952104 Sikorska-Fighiera Ada Heroldo